



OMOTO INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Sidejo : 4, rue de Vaugirard, PARIS (VI^e)

Jarabono por Francujo : 5 fr. fr.

Redaktoro : K. NIŠIMURA

Jarabono por aliaj landoj : 2 sv. fr.

Statuto de la "Universala Homama Asocio"

CELO

La Universala Homama Asocio estas fondita kun la celo atingi fratigon kaj unuigon de la tuta homaro, per la aligado de la kredo. On voias agi per amo kaj bono, kaj klopodi laŭpove por la starigo de ideala mondo, kie oni povus ĝui eternan feliĉon kaj ĝojon.

Ĉiu homo havas ian propran kredon, kaj esperas ke venos la tempo, kiam la feliĉo kaj ĝojo lumigos ĉiujn partojn de la mondo. Tamen por tio estas necese, ke ni vivu en vera kredo, kaj unuigu sincere vere universale, por efektiviĝi nian idealon.

La homaro devenas el sama fonto, Dio, kaj sekve estas la frataro. Se la homoj simplanime returnus al sia origina natureco, ili ne povus ne veni al la universala unuigo. Kvankam ĉiuj religioj iom diferencas inter si, en la formoj kaj la ekzezoj, tamen iliaj origino kaj celo devas esti tute samaj. Sed la hodiaŭa homaro, pro la diferencoj de la raso, nacieco, religio, aŭ pro aliaj necesaj cirkonstancoj, nekonscie starigas la intermurojn, kaj fieliĝi pli kaj pli malproksimiĝas de la vera paŝo kaj feliĉo, je nia granda bedaŭro.

Nur parolante pri la anoj de religioj kaj aliaj kredantoj, sed ankaŭ pri ĉiuj, la samopiniuloj estas sincere petataj bonvole manpremi unu la alian por atingi la veran kredon, kaj klopodi por la feliĉo kaj ĝojo de la tuta homaro. Jen estas la kialo de la fondaĵo de la nuna asocio.

ORGANIZO

1. UHA havas sian centran oficejon en urbo Ajabe, Kioto-fu, Japanujo.
2. UHA havas Komitaton, kiu konsistas el jenaj oficejoj por administri la aferojn : a) unu ĉefkomitatano ; b) pluraj komitatanoj.
3. UHA havas laŭbezone la filiojn kaj naciajn komitatanojn en diversaj landoj.
4. Aligo al UHA estas senpaga kaj sen formalajoj.
5. La enspezoj de l'Asocio formiĝas el la kotizoj de helpemuloj.

PRĀTIKA PROGRAMO

1. UHA okazigas laŭbezone siajn universalajn kongresojn.
2. La anoj kunvenas en siaj lokoj kaj interŝanĝas la opiniojn por firmigi la kredon kaj realigi la principojn.
3. De tempo al tempo UHA eldonas broŝurojn kaj foliojn por la propagando kaj por la informado de la Asocio.
4. UHA okazigas paroladojn, kunvenojn kaj kunsidojn kun la celo praktika aŭ propaganda.
5. Laŭ la bezono UHA sendas kompetentulojn al diversaj landoj.
6. La asocianoj devas respekti ĉiujn aliajn kredojn, kaj klopodi reciproke helpi unu la alian.
7. UHA klopodos, por vojo de la leĝo, enkonduki plibonigojn al la religio, edukado kaj ceteraj sociaj aferoj.
8. UHA adoptas Esperanton kiel internacian helpingvon.
9. UHA eldonas ĉiumonatan gazeton en Esperanto.

Cefkomitatano : S-ro Sengecu Deguci.

Centra komitatano : S-ro Koogecu Nišimura.

Adresoj de UHA :

Oomoto-Oficejo, Ajabe, Japanujo.

Eŭropa Centra Oficejo de Omoto : 4, rue de Vaugirard, Paris. (VI^e).

Statuts de l'Association Universelle Amie de l'Humanité

BUT

L'Association Universelle Amie de l'Humanité a été fondée dans le but d'arriver à la fraternité et à l'union de tous les hommes du monde, par l'élevation des croyances. Elle se propose d'agir par l'amour et la bonté. Elle s'efforce dans la mesure du possible, d'organiser un monde idéal, dans lequel on pourra jouir, dans la joie, d'une éternelle félicité.

Chaque homme a une croyance qui lui est propre, il attend l'avènement d'un temps, où le bonheur et la joie illumineront toutes les parties du monde. Mais il est nécessaire pour cela, que nous vivions dans la même croyance et que nous nous unissions sincèrement, véritablement, universellement.

Tous les hommes sont issus d'une même origine, Dieu, par conséquent ils sont tous frères. S'ils retournaient simplement à leur état primitif de nature, ils ne pourraient s'empêcher de venir à l'union universelle. Bien que toutes les religions aient entre elles certaines différences dans leurs formes et dans leurs Eglises, elles n'en ont pas moins la même origine et le même but. Mais l'humaine acédie, à cause de la diversité des races, des nationalités et des religions, ou pour tout autre motif n'ayant rien d'essentiel, dresse inconsciemment des barrières, et s'éloigne de plus en plus, à notre grand regret, de la véritable paix et du bonheur vrai. Non seulement les religieux et les autres croyants, mais encore tous ceux qui pensent comme nous sont invités à se serreciproquement la main pour acquérir la même foi et travailler au bonheur et à la joie de toute l'humanité. Telle est la raison de la présente Association.

ORGANISATION

1. L'A. U. H. a son bureau central dans la ville d'Ajabe, Kioto-fu, Japon.
2. L'A. U. H. a un comité composé des employés que voici : a) un Président de comité. b) un certain nombre de membres formant ce comité.
3. L'A. U. H. aura suivant les besoins des filiales et des comités nationaux dans divers pays.
4. L'adhésion à l'A. U. H. est entièrement libre et n'exige aucune formalité.
5. Les ressources de l'Association proviennent des cotisations des Membres bienfaiteurs.

PROGRAMME PRATIQUE

1. L'A. U. H. organise suivant les nécessités ses Congrès Universels.
2. Les Membres se réunissent dans ses locaux, pour échanger leurs idées, affirmer leurs croyances, et mettre les principes en pratique.
3. De temps en temps, l'A. U. H. édite des brochures et des feuilles de propagande et d'informations relatives à l'Association.
4. L'A. U. H. organise des conférences, des assemblées et des réunions à buts pratiques de propagande.
5. L'A. U. H. envoie suivant les besoins des hommes compétents dans les divers pays.
6. Les Associés doivent respecter toutes les autres croyances et s'efforcer de se prêter une mutuelle assistance.
7. L'A. U. H. fera tout son possible pour introduire par les voies légales des améliorations à la religion, à l'éducation et à tout ce qui intéresse l'ordre social.
8. L'A. U. H. adopte l'Espéranto comme langue auxiliaire.
9. L'A. U. H. édite tous les mois un journal en Esperanto.

Président du Comité : M. Sengecu Deguci.

Membre du comité central : M. Koogecu Nišimura.

ADRESSES DE L'A. U. H.

Oomoto-Bureau, Ajabe, Japon.

Bureau Central Européen de Omoto : 4, rue de Vaugirard, Paris.

The Association of Universal Love and Unity

The Object in View

This Association aims at a Universal Brotherhood and Unity, and wishes to do its utmost to bring about an ideal world in which the virtues of love and truth and increasing faith shall reinforce one another for our lasting happiness and prosperity.

Men have now different faiths according to their circumstances, but they all hope for a world that is bright with happiness and joy in every part of it. It is, however, necessary for them first to live in true faith and be united universally from the bottom of their hearts in order to bring their sincere hope into effect.

Humanity, we presume, originated from one same source, and therefore all men are brothers. If they will consider their origin with simplicity and sincerity, they cannot but make up one worldwide unity.

Although some religions have differences in form and dogma, yet their origin and object are one and the same. But the human races of to-day, with their racial, national, religious and other differences make blind walls between themselves. It is to our great sorrow that they are thus going further and further astray from the true peace and happiness of the world.

We most sincerely hope and appeal, not only to the religionists and other followers of God's teachings, but also to the general public who hold opinions similar to ours, that they will unite with us to advance in the true faith, and thus endeavour to bring about universal peace and happiness. For this reason we have founded the above association.

The Organisation

1. The Association has its central office in the city of Ajabe, Japan.
2. The Association has an executive committee consisting of the following officials : a) one chief commissioner ; b) several commissioners.
3. The Association will establish Branch Offices with commissioners in different parts of the world, as occasion requires.
4. The Association welcomes all who wish to join, and is ready to give them every facility personally or by correspondence, as far as possible.
5. The expenses of the Association are to be met by voluntary subscriptions from those who desire to help it.
6. The expenses of the Branch Offices are to be met by the local members.

The Practical Programme

1. The Association will hold Universal Congresses when necessary.
2. In the different parts of the world, the local members can arrange meetings for discussion of the means of bringing our principles into effect.
3. The Association will publish pamphlets and other printed matter from time to time for the propagation of our principles and the preservation of unity among its members.
4. The Association will from time to time arrange speeches and lectures to propagate and give effect to our principles.
5. The Association will send out efficient members to different parts of the world for propaganda, as considered necessary.
6. The members shall respect and regard the different faiths of their fellow members, and also endeavour to help one another in bringing Love and Peace into society.
7. The Association will endeavour, by constitutional means, to bring necessary improvements into religions, educational systems, and other branches of social affairs, when they are wanted for the benefit of mankind.
8. The Association adopts Esperanto as the international auxiliary language.
9. This Association publishes an Esperanto magazine every month.

The chief commissioner : Mr. SENGETSU DEGUCHI (Ayabe).

A central commissioner : Mr. KOGETSU NISHIMURA.

SALUTO

Okaze de la eldono de nia unua numero ĉi tie en la ĉefurbo de Eŭropo, mi volas diri kelkajn vortojn.

Oomoto, kiu signifas « granda bazo de l'Universo », estas kompare nova spirita movado, fondita en malgranda urbo de Japanujo por enpenetriĝi kaj restarigi la nunan mondon, por realigi la universalan pacon kaj amon kaj tiel venigi sur la tero ĉielan regnon.

Estas multe da tiaj movadoj en nia tempo, kaj ili klopodas trovi novajn vojojn por konduki la mondon al pli luma, pli prudenta kaj pli trankvila periodo. Sed nia movado estas iom pli mistika en sia fondo, ĉar ĝi estis fondita de Dio mem.

La unuan de Januaro 1890, S-ino *Nao Deguĉi*, tiam malriĉa 57-jara vidvino en Ajabe, Japanujo, subite ricevis iluminacion de Dio, komencis eldiradi inspiritajn parolojn, kaj poste eĉ skribadis siajn instruojn kaj profetaĵojn, kies vereco iom post iom konfirmiĝas. Ŝia skribaĵo kreskis en 27 jaroj ĝis ĉirkaŭ 200.000 paper-folioj.

La dua fazo grava de nia movado estas la aliĝo de S-ro *Onisabro Deguĉi* al la laboro de la sankta fondintino. Vere estas notinda afero, ke, kiel Kristana Johano atendis la alvenon de Kristo, tiel la Oomoto-Patrino ankaŭ profetis kaj atendis la alvenon de Dia Homo, kiu plenumos la grandan taskon de mondsavado. Kaj S-ro Onisabro Deguĉi ja venis 7 jarojn poste, kaj jam ĉirkaŭ 30 jarojn li sin okupadas en energia propagando de Dia vojo, malgraŭ konstanta persekutado. Li estas ankaŭ de malriĉa deveno.

Laborema, homama, modesta, li de l' frua aĝo aŭdis internajn voĉojn, kaj poste kompletigis la Oomoto-instruon en nuna definitiva formo.

Li skribis multajn instruojn; interalie *La Rakontoj el la Spirita Mondo*, kiu estas mistike farita kaj mirinde ampleksa. El ili estas jam presitaj japanlingve 76 volumoj kaj ankoraŭ 50 selkvos. Tiu ampleksa verko, kiu havas pli ol 28.000 paĝojn, estis finverkita dum malpli ol unu jaro. Dum lia verkado, li nur diktas, kuŝante en la lito kun neniu

libro ĉirkaŭe, ĉiam fumante kaj ridante, kaj liaj disĉiploj kopias. La enhavo estas divers-aspekta. La fondo de l'universo, la vera stato de l' Ĉiela kaj Infera Regno, la kialo de Dia volo por restarigo de l' mondo, interesaj rakontoj de propagandistoj pri Diaj vojoj en la epoko de antikva Dia regimo, profetaĵoj kaj moralo, amo kaj vero, ĉiuj temoj estas plenumitaj en la sankta verkaro. Oni ankaŭ eldonas ĉiumonatan gazeton esperantan en Japanujo por sciigi pri tiuj ambaŭ instruoj, sed bedaŭrinde tio estas tro malproksima por niaj Eŭropaj gefratoj, kaj tial mi decidis montri al ili la enhavojn de l'sanktaj skribaĵoj montritaj de l'Oomoto-Patrino kaj la Sankta Majstro Onisabro Deguĉi, en monata ĵurnalo, kiun mi eldonas tute proksime al okcidentaj pacamantoj por la pligranda disvastigo de Dia vojo.

Nun nia movado staras efektive sur la homaranismo kaj estas tute neŭtrala al ĉiuj aliaj spirititaj movadoj kaj religioj. Sankta S-ro Onisabro Deguĉi volas la ligan de ĉiuj religioj kaj ankaŭ iniciatis la *Universalan Homaman Asocion*, kies statuton ni donas sur la unua paĝo de l'nuna numero.

Ni esperas ke Eŭropaj gefratoj aliĝos multnombre al la Asocio; la aliĝo estas tute senpaga.

Jam la Mesio Kristo revenas, kaj li aperas kiel granda suno en la Oriento! Grava estas la tempo. Mi plej sincere petas al la legantoj, ke ili bonvole turnu sin al nia movado, kaj kunlaboru kun ni por la efektiviĝo de la universala paco kaj fratiĝo.

K. N.

La nutraĵo de animo estas bona instruoj, la resanigilo por animo — fido al Dio.
ONISABRO DEGUĈI.



Majstro ONISABRO DEGUĈI

Sankta Vivo de Majstro Deguĉi

ANTAŬPAROLO

La Oomoto-movado estis fondita de homoj de dia karaktero, kiuj aperis por plenumi la grandan taskon de mondsavado.

La kreintino de Oomoto profetis la alvenon de l'Mesio, ŝi anoncis la aperon de l' dia regno, kaj rekte klopodis por ĝi elportante ĉiuspacajn afliktojn kaj suferojn, baptante personojn per akvo, kaj atendante la revenon de Kristo.

Sep jarojn atendis la kreintino ĝis kiam ŝi unuafoje renkontis la nunan ĉefgvidanton de l'Oomoto-movado.

Ĉiuj antaŭaj religioj havis karakteron severan, rigidan, neflekseblan, la saman karakteron havis ankaŭ la instruo de Nao Deguĉi. La dua kreinto de l'Oomoto, sinjoro Onisabro Deguĉi, enportis la karakteron mildan, flekseblan, homecan kaj tiamaniere estis kunfandita la definitiva Oomoto, instruo kompleta, kiu unuigis la severajn postulojn de l'idealo kun la mildaj cirkonstancoj de l'reala vivo. Kaj tiel la Dia vojo estis montrita en la kompleta formo. Parolante per simboloj, la vertikala fajro de l'severeco, anoncita de l'sankta

virino kaj la horizontala akvo de l'mildeco, alportita de l'nuna ĉefo, ambaŭ kuniĝis por formi la kompletan krucon, signon de l'perfekto.

Nu la profetino estis virino korpe, sed vireca anime. Ĉe sia 57-jara aĝo, ŝi unuafoje partoprenis en la Dia plano, kaj de la 1-a tago de Januaro 1892 ĝis la fino de l'jaro 1912, dum 20 jaroj, ŝi donadis akvan bapton al la malvirta mondo, kaj tiel ŝi ekstarigis la Dian planon por plibonigado de la mondo. La lasta mondmiito estis ja profetita de l'kreintino kaj tio estis unu el la grandaj avertoj por la tuta homaro.

Doni al mondanoj fajran (spiritan) bapton estas alta tasko donita al la nuna ĉefo de la Oomoto-movado, S-ro Onisabro Deguĉi.

Li naskiĝis la 12-an de julio 1871 kaj aperis kiel la Savanto de l'mondo la 9-an de Februaro 1898, kaj ĝis la 9-a de Februaro 1918, dum 20 jaroj, li plenumis sian sanktan devon spiritan por la mondbonigado.

La nuna mondo estas ensorĉita de materia civilizacio, ateismo, kaj senanimismo, sed hodiaŭ plimultigas personoj, kiuj ekvekiĝas kaj konstatas la ekziston de animo kaj Dio. Tio rezultas de Dia influo, sed neniel de la homa povo aŭ inteligenteco.

Kiam la Oomoto-Patrino eliris el sia domo, nepre pluvigis, kaj kiam la nuna ĉefo eliris, ĉiam serenis. Dum siaj 50 jaroj, la ĉefo S-ro Deguĉi neniam kunportis ombrelon, li tute ne

havis neceson ĝin porti. La kreintino estis aginta kiel la kristana Johano-Baptisto, kaj la Sinjoro ĉefo kiel la Mesio. Sur siaj manoj la ĉefo portas dek najlosignojn sanktajn, kiujn ricevis Kristo antaŭ du mil jaroj, kaj li portas ankaŭ signon de Orion-stelaro sur sia dorso. Laŭ la Dia plano, Johano kaj Kristo reaperos en la nordorienta parto de l'tero. Kaj Japanujo estas ĝuste la lando kiu sin lokas nordoriente de la Malnova kontinento.

Koogecu Nišimura.

**

S-ro Onisabro Deguĉi estis nomita, dum sia junaĝo, Kisaburo Ueda. Li estis unuenaskito de Josimacu Ueda, kiu estis farmisto en la vilaĝo Anao, en la regiono de Kioto. Lia patrino estis nomata Jone-Ko, kun ŝi edziĝis Josimaĉu Ueda adoptita de ŝia familio. La Ueda familio devenas el la nobela familio Tujihara kaj havis inter siaj familianoj Okjō Marujama, unu el la plej famaj kaj konataj pentristoj, kiu vivis antaŭ sep generacioj.

Dum la regado de la japana imperiestro Jurjaku, kiu regis antaŭ pli ol mil jaroj, la plej granda japana sanktejo translokiĝis el la vilaĝo Hinumanai, en la provinco Tamba, al la malproksima vilaĝo Jamada, en la provinco Ise. Dum la transportado de la sanktaĵoj, oni survoje ripozis en la vilaĝo Anao, sur la korto de la domo de Ueda-familio.

S-ro Kisaburo Ueda naskiĝis la 12-an de

La Krizo de la Religio

Krizo de religio estas nun, kiel ni povus ne? Religioj, novaj kaj malnovaj svarmas kiel formikoj. Al kiu kredi el ili, ni ne scias. Se ekzistas entute vereco, ĝi ne povas havi mil aspektojn. Nur unu religio povas esti prava. Kiel elekti? Anstataŭ ekzameni la specialan kazon de ĉiu aparta sekto, ni ekzameni la problemon iom el filozofia vidpunkto.

Monismo kaj dualismo estas la potencaj kaj kontraŭaj mondkomprenejoj, kiuj ambaŭ pretendas klarigi la Universon. Neniu el ili estas perfekta, ĉar la karaktero de ĉio homa estas la malperfekteco. Oomoto, la nova religio, venanta de la malproksima (Oriento estas la ponto inter monismo kaj dualismo; ĝi estas pli, ĝi estas la ponto inter du grandaj fluoj de ideoj: la okcidenta kaj la orienta pensado.

Pensaĵo sen korpo ne ekzistas; penso kaj fiziko estas du flankoj de la sama afero. En la teorio de la Dieco bazita sur la Suno, kaj la sciencistoj kaj la religiuloj povas trovi kontentiĝon. Oomoto anoncas novan paragrafon inter la militantaj religioj.

La teorio de Darwin pri la evoludo ankaŭ ne estas en kontraŭdiro kun Oomoto. La mondo unu foje kreita povis evolui laŭ la leĝoj de la naturo.

La ekzisto de multaj homoj ĉiuj havantaj animon supozigas unu grandan animon de la mondo. Oomoto konceptas tielmaniere sian Dion. « Ex nihilo nihil fit; nihil in nihilo revertitur » — diras la enmetafiziko ofte citata latina frazo, kiu signifas: nenio povas fariĝi el la nenio; nenio povas esti nenigita. Jen principo komuna de religio, kaj scienco, konfirmita de Oomoto.

Ni estas, ke ni ne devenas de la Nenio, sekve ni ne povas fariĝi nenio. Ni estas partoj de la Tuto, de la Granda Universo, la plej granda infinito de la matematikoj, kiun oni nomas: W. La unua realaĵo de la mondo estas la vivanta animo de la mondo; nia animo estas parto de tiu granda animo, por la momento individuiginta. Post la morto tiu animo ere reiras al la granda animo de la mondo.

Ni ne pretendas, ke la nuna sistemo de Oomoto estas perfekta.

Sed Oomoto ĉiam progresadas; ĝi ne estas konstanta, konservativa, sed fluida, demokrata, kaj ĝi nur celas marŝi ĉiam antaŭen al perfekteco estonta, forlasante la neperfektan estantecon.

Julio 1871, kaj montriĝis jam en sia infaneco tre genia kaj sprita, kaj oni lin nomis « Dia knabo ». Li havis ankaŭ tre bonan memorokapablon, kaj kion li unufoje aŭdis, li ĉiam memoris, kaj tial oni nomis lin, laŭ japana kutimo, « ok-orela knabo ».

En la distrikto, kie li naskiĝis, estis tre forta Budhismo, sed li estis ĉiam jam de la infaneco tre pia, kaj preĝis multe kaj adoris Dion. Pro tio li estis ĉiam la celo de atakoj ne nur de fremdaj, sed ankaŭ de sia propra familio, ĉar li ne adoris la Budhajn idolojn.

En tiu tempo, la Ueda familio tre malriĉiĝis kaj li eĉ ne povis fini la vilagan lernejon. Kaj li kun sia patro laboris en la kampoj aŭ kolektis branĉojn en la arbaro por poste vendi ilin kaj tiamaniere vivteni sin kaj sian familion.

Kiel dekkvarjara knabo li fariĝis helpinstruisto en la vilaĝa lernejo.

Sed unufoje, li parolis tro entuziasme pri la Dia vojo, kaj la alia instruisto-Budhisto koleris, okazis disputo kaj li foriĝis pro tio el la lernejo.

Kaj li laboris poste dum unu jaro kiel simpla laboristo kaj servisto ĉe la najbara, riĉa familio.

En tiu tempo okazis grava disputo inter lia patro kaj najbaraj familioj, kiuj nombris 135, pro lia posedado. Multe tiam lia patro suferis. La vilaganoj volis al si alproprigi lian lageton. Por helpi al sia patrino Kisaburo Ueda forlasis

Post la morto ni do vivos eterne, sed tiu vivo ne plu estos la egoista individuala vivo, sed la kolektiva ekzisto ĉe la sino de la mondspriteco.

La celo de la vivo estas la feliĉo. Ne la feliĉo de la superflujaj sinamuzoj, sed la vera feliĉo, bazita sur la moralo, sur la plenumo de ĉies vivo, unuvorte, belo, bono, harmonio. Jen triunu, venanta el malproksima tero, ĝi sentigas ankoraŭ la aromon de la oceana vento, ŝvebanta super Japanujo, lando kiu donis al ni Oomoton.

La moralo estas la potenca voĉo de la Homaro, kiu baras niajn egoistajn aspirilojn kiam ili endangerigas la ekziston de la Tuto. *Deĝuĉi* mem kaj ĉiuj aliaj anoncantoj de Oomoto, ne estis aliaj ol tiu potenca voĉo de la Homaro, inkarnita en Dio. Tiu potenca voĉo ĉesigos baldaŭ la batalon inter la sektoj. Ne plu estos judoj, kristanoj, mahometanoj kaj budhanoj, sed estos nur Diistoj kaj Neantoj. La unua sintezo, la sintezo de la religioj estas la verko de Oomoto, la dua sintezo, la sintezo de Religio kaj Ateismo estas la perspektivo de la estontaj tempoj.

Mi ne pretendas funde koni la potencon movadon Oomoto. Eble neniu Eŭropano ĝin ankoraŭ komprenas detale. La ĉ. ducento da libroj kiuj parolas pri ĝi en japana lingvo povas enhavi grandajn-trezorojn. Atendante ke la ĉefaj fontoj aperu en la Internacia Lingvo, ni sekvu tiun ĉi simpatian movadon kun granda kaj bonvola atentemo.

JOZEF MAJOR.

EL LA OOMOTO-MOVADO

Ni sciigas, ke komence de tiu ĉi monato S-ro Koogecu Nišimura, la reprezentanto de la Obmoto-movado, veturos al Hispanujo kaj poste daŭrigos la vojaĝon al la altaj landoj.

Ni insistas petas ĉiujn societajn, grupojn, kiuj volus aŭdi la paroladon de S-ro Nišimura bonvole tuj sendi la invitojn al nia Redakcio.

La Esperanto-Asocio de Estonio decidis, se la propagandanto por la orienta spirita movado « Oomoto » decidus veturi Estonion, E. A. E. estas preta havigi al li tradukantojn de liaj esperantaj paroladoj.

Gazetaro. — Krom en la esperantaj gazetoj, kiuj sufiĉe detale raportis pri la Oomoto-mov-

la servadon ĉe la riĉa familio, kiu estis ankaŭ malfavora por lia patro.

Kaj la juna Kisaburo defendis brave kaj kurage sian patron kontraŭ la postulemaj vilaganoj. Kaj jam post kelkaj tagoj li regajnis ĉion. La afero finiĝis, sed la vilaganoj ĉiam malhelpadis al lia familio perlabori en la vilaĝo kaj ĝi ankoraŭ plimalriĉiĝis. La juna Kisaburo komprenante, ke la homa koro estas malvarma kaj glacia, ĉiutage vizitis la vilagan sanktejon kaj fervore preĝis kaj plifortiĝis lia kredo al Dio!

Jam kiel dektri-jara knabo, li deziris savi la mondon, kaj kiam nun li dum la disputoj kun la vilaganoj konstatis kun bedaŭro, ke la homa koro estas malvarma kaj sensimpatia, lia ardo por la granda ideo plifortiĝis.

Sed ĉar li vivis tre mizere kaj perlaboris sian ĉiutagan panon kun sia patro kiel ŝarĝoportisto, li ne povis la tutan tagon restadi en la sanktejo.

Kiel al dekok-jara junulo okazis al li miraklo sur la intermontaĵo Naŝi-no-ki, kie aperis al li la spirito de Ĉikaacu Honda, konita spiritisto en Japanujo.

(Daŭrigota.)

La vera kredo fariĝas nur tiam, kiam Dio kaj homo estas en bona harmonio.

ONISABRO DEĜUĈI.

ado, aperis ankaŭ komuniko en alilingvaj jurnalaj pri nia movado. Ni ricevis: *Mysl Wolna* (N° 8/9, 19-10-25) Polujo, *Swiatowid* (N° 39, 26-9-25) Polujo, *Oeffentlicher Anzeiger* (N° 200, 5-11-15) Germanujo.

Ni petas niajn amikojn alsendadi al ni gazetojn, en kiuj troviĝas iu ajn komuniko rilatanta al nia movado.

DIVERSAĴOJ

Ligo de Nacioj en Azio?

Laŭ *New-York Herald* (16-11-1925) la turkaj ŝtatistoj subtenataj de Ruslando proponas tute serioze fondi Ligon de Orientaj Nacioj, ĉar la okcidentaj politikuloj opinias la aziajn popolojn malsuperaj; sole Japanujo sukcesis fariĝi escepto. La Okcidento opinias, ke la Oriento ne estas kapabla sin mem administri kaj arangi siajn proprajn aferojn.

Se tia politiko daŭrus, ĝi povus alporti iam tute nature kaj neeviteble la plej kruelan militon inter Okcidento kaj Oriento.

“Tro riĉa” — danĝero

En novembro kj., D-ro Thirkfield faris tre interesan paroladon antaŭ la amerika episkoparo. En ĝi li montras, ke Ameriko malsukcesas en sia evangelia misio en la mondo, pro manko de pli alta vizio, morala kuraĝo kaj ankaŭ pro ĝia egoisma celo. « Usono estas ankaŭ en krizo pro tro multe da mono, la oro de la tuta mondo surpezas nin », ekkrias S-ro Thirkfield. « Ni estas tro riĉaj kaj ni vidas ĝian efikon en pligrandiĝo de lukso, maljusteco kaj malvirto — la vojo, kiu kondukis Romon al ĝia disfalo. »

Sed ĉu la malriĉa Eŭropo ne ankaŭ sekvas la saman vojon?

Se la UNUA NUMERO ne plaĉas al vi, se vi deziras ŝanĝojn, aldonojn k. s., skribu al ni. Se ili estos bonaj, efektivegaj, ni sekvos ilin kaj jam la dua povos esti laŭ via plaĉo. Sed tuj sidigu kaj skribu! Antaŭen dankon!

PRI ĈIO KAJ NENIO

La 15 de Novembro 1925.

Kara-amiko,

Vi plendas al mi, ke en la esperantaj gazetoj oni neniam da spaco dediĉas por respeguligi la politikajn okazintaĵojn, kaj vi petas min, ke mi bonvolu ĉiumonate sendi al vi leteron, en kiu mi donu la ĝeneralan bildon de la lastmonataj okazintaĵoj en la politika vivo.

Kvankam la tempo ne permesas al mi skribi al vi multe, mi tamen konsentas, ĉiumonate doni al vi kiel eble plej ĝeneralan vidon.

Mi petas vin, ke vi indulgu miajn leterojn, se ili ne estos tute laŭ via gusto kaj mi estos al vi tre dankema, se vi bonvolos en viaj leteroj esprimi vian kritikon kaj mi ĉiam klopodos laŭ ĝi plibonigi miajn leterojn.

Via

SINCERULO.

NE MALFRUIGU kun alsendo de via abonpago. Faru tion SENPROKRASTE, alie vi riskas ne plu ricevi la duan numeron.

Nia konsilo estas tuj ekaboni:

OOMOTO kun ESPERANTO-MONDO.

ESPERANTO-MONDO

Redakcio kaj Administracio : 4, rue de Vaugirard, PARIS (VI^e)

AL NIAJ AMIKOJ

Jen aperas nia unua numero, kiun ni dissendas senpage al ĉiuj anguloj de l'mondo. Ĝia prezo mal-kara, ĝia abonpago, kiu sufiĉas nur por la ekspedado de la gazeto, kredigas nin, ke niaj multaj amikoj fariĝos ĝiaj abonantoj.

Nia gazeto krom sia tendenco kiel organo de la Universala Homama Asocio havas ankaŭ aldonon *Esperanto-Mondo*, kiun ni klopodos fari kiel plej interesa kaj doni en ĝi la veran respugulon de nia movado.

Ĝia perfektigo dependas tamen de vi, niaj karaj legantoj kaj amikoj, nur de vi; nur vi povas helpi, ke ĝi estu kiel plej interesa kaj valora. — Ni kalkulas je via konstanta kunlaborado.

Ni esperas, ke ankaŭ la esp-istoj-eldonistoj bonvolos al ni alsendadi siajn verkojn por recenzo, kiujn ni nepre senpartie, tute objektivite juĝos. Pro tio — la fuŝaĵojn plej bone ne alsendu!

Ni esperas, ke nia gazetaro kun amika sento akceptos nin en sian rondan kaj ke ni kune povos kunlabori por la bono de nia movado.

Unuvorte: Nia celo estas doni en la venontaj n-roj la veran bildon de nia movado.

Ke ni estas fidelaj al nia lingvo kaj ĉiam ĝin defendos — tion vi sentas jam en tiu ĉi n-ro.

ESPERANTO-MONDO.

La UNUA NUMERO, en kiu ne kunlaboris ankoraŭ niaj legantoj, ne povas esti eĉ laŭ nia propra deziro, tion vi scias. Do memoru, ke ankaŭ via kunlaboro estas bezona, ke sen ĝi **ESPERANTO-MONDO** estos ĉiam malperfekta.

AL PRIPENSO

LA KANTO DE L' KUKOLO

En Britanujo oni kredas, ke feliĉon alportas la aŭdado de kantantaj kukoloj.

Du fratoj laboradis sur kampo. Ekkantas kukolo. Unu el la fratoj diras al la alia:

— Unue mi aŭdis ĝin: ĝi por mi kantis. Mi

tuj aĉetos la najbaran domon, kiun mi deziras de longe.

— Ne — diras la alia — por mi ĝi kantis. Mi volas vendi mian ĉevalinon, kaj mi estas certa, ke mi ricevos por ĝi multe da mono.

— Sed ne! tio estas por mi. Iru ni ambaŭ al la juĝisto.

Ili iras al la juĝisto kaj diras al li:

— Vi havas grandan spertecon: eltiru nin el nia necertececo. Mia frato diras, ke por li la kukolo kantis; sed mi diras, ke por mi ĉiam.

— Antaŭe, metu tien ĉi po unu arĝenta monereto, diris la juĝisto.

Poste, kiam ili estis metintaj siajn monerojn, ĉion enposiĝis la juĝisto, respondante al ili:

— Vi bone vidas, ke por mi kantis la kukolo.

TU. CART.

VI NE HAVAS MONON POR EKABONI OOMOTO? Instigu nur kvin viajn amikojn kaj vi ricevos ĝin senpage.

1925

Se ni rigardas malantaŭen, se ni rigardas tra la juro 1925, ni konstatas kun ĝojo kaj kun fiero, ke ni ne perdis ĝin, ke ni atingis multajn sukcesojn sur ĉiuj kampoj de homa socio, en multaj kongresoj kaj konferencoj, ke nia lingvo fariĝis socia demando, ĝi ĉie eniĝas, ke multaj, kiuj antaŭ helka tempo estis indiferentaj, simpatias kun ni, helpis al ni sur nia vojo.

Kaj kiam ni pripensas la venontan jaron, ni volus denove rekomendi tion, kion ni tiomfoje rekomendis, por kio ni ĉiam pledis, ke ni profitu el la rezolucioj, el niaj venkoj, ni ne lasu ilin sur la papero, ni ne lasu ilin neefektiveblaj, ni uzu nian lingvon kiel plej multe; ni devas montri, ke ni batalas ne por utopio sed por reala vivo, por vivanta lingvo!

Ni alpaŝu kun ĝi ĉie fere kaj ni miru, se oni ne konas ĝin, se oni ne komprenas ĝin, nur tiam ni atingos la veran venkon!

Esperantistoj, nia potenco estas en niaj propraj manoj!

Tio estu nia ago en la Nova Jaro.

S. GRENKAMP.

VI ESTAS NEREKLAMITA POETO kaj oni ne volas akcepti vian poemon? Sendu ĝin al ni; se ĝi estas bona ni publikigos, se ĝi nenion valoras, tiam aldonu poŝtmarkon kaj ni resendos ĝin al vi.

RECENZEJO

En tiu ĉi rubriko ni koniĝe raportas pri ĉiuj al ni po dukzemplere alsendotaj libroj. Verkoj en aliaj lingvoj ankaŭ akceptataj.

La Malaperinta amiko, aŭ La nedaŭraj reen-korpiĝoj en Mantes. (L'ami disparu ou Les renaissances éphémères de Mantes s. Seine, France.) 3-a eldono. Jules Thiébaull. Ĉe la aŭtoro, Carignan (Ardennes), Francujo. — 100 paĝoj, 14 × 21 1/2 cm.

VI HAVAS VIAN PROPРАН STILON? Ni admiras ĝin kun la aliaj, sed permesu al ni korekti la gramatikajn erarojn. Ĉiu plumo povas erare skribi unu akuzativan finaĵon pli aŭ malpli...

Senpage

kaj afrankite ni sendos al vi je deziro kelkajn specimenajn numerojn de

Heroldo de Esperanto

kiu aperas dufoje en la semajno en granda formato, kun diversspeca enhavo kaj ilustra.

★

Skribu tuj al la administracio

Heroldo de Esperanto

Horrem b. Köln (Germanujo)

El nia Movado

AŬSTRUJO. — Vigla movado, precipe en Vieno, kursoj ankaŭ en Klosterneuburg, Salzburg kaj Weidling.

BELGIO. — Festeto en Malines.

ESTONUJO. — La movado estas tie ĉi tre vigla. Okazis kursoj, paroladoj kaj festetoj en Haapsalu, Purila, Tallin, Tartu, Valk, Võru.

FRANCUJO. — Tre forte revigligis la movado. Multaj kursoj en Alais, Bischwiller, Paris, St-Maur, St-Ouen, k. t. p., k. t. p. Favoraj artikoloj pri niaj lastaj sukcesoj aperis en multaj gazetoj. La gazeto « Les Dernières Nouvelles de Strasbourg » enkondukis esp. rubrikon.

GERMANUJO. — Kiel ĉiam ni povas noti grandajn progresojn. Kursoj en multaj urboj: Bad-Kreuznach, Berlin, Bamberg, Delmonhoret, Euskirchen, Freiburg i. B., Heilbronn a. N., Krefeld, Viersen, k. t. p. Okazis diversaj festoj, propagandaj semajnoj, ks. en Bochum, Heilbronn a. N., Berlin, Mainz, Meisen. Fondiĝis grupoj en Krefeld, Pirna a. E.

HISPAŬJO. — Kursoj en Barcelona, Cadix, Madrid. La madridaj gazetoj: « La Escuela Moderna », « El Magisterio Español », « La Revista Técnica de la Guavelia Civil », « El Socialista », « Ibérica » enhavis artikolojn pri Esperanto. La Kongreso de Naturistoj en Bilbao rekomendis Esperanton.

JAPANUJO. — La esperanta movado estas tre vigla. En oktobro okazis la XII-a Japana Esp. Kongreso sub la prezido de D-ro *Simura*, profesoro en la Imperia Universitato de Kioto. S-ro *Onisabro Deguĉi* mem reprezentis la Oomoto-movadon kaj faris tre interesan paroladon. Ankaŭ eŭropaj gastoj estis bonvenintaj. Okaze de la VI-a Kongreso de Ekstremorienta Asocio por Tropika Medicino en Tokio kelkaj japanaj profesoroj prelegis en Esperanto: oni disdonis inter la gastoj propagandilojn pri la lastaj progresoj de Esperanto precipe en la medicina medio. Ni admiras la gigantan laboron de japanaj amikoj kaj esprimas ĉi tie nian gratulon. Ni ekscias, ke nia japana konata pioniro S-ro *Osaka*, jam estas en Ameriko kaj post unu jaro venos Eŭropon.

POLLANDUJO. — Kursoj en Krakovo, Lublin, Leopolo, Varsovio.

RUSUJO. — Aperis oficiala poŝtkarto kun skriburo en tri lingvoj: rusa, franca kaj *esperanta*, kaj poŝtmarkoj 7 kaj 14 kopekoj kun portreto de Popov kaj subskribo « Inventisto de Radio-Popov ».

REDAKCIA KORESPONDO

S-ro I. G. — Ni dankas por via letero kaj komunikas al vi, ke ni memkompreneble ĉiam estas je via dispono kaj volonte servos per konsiloj. Vi estas prava, la vorto *geŝo*, kiun uzas Baghy en sia poemo « Kantantaj postenoj » (*Esperanto*, N° 11, novembro 1925), ankaŭ al ni ne plaĉas kaj ni rekomendas al vi uzi « *geŝo* »; tiel vere sonas ĝia japana origino kaj tiel transprenis ĝin multaj lingvoj.

S-ro S. K. en S. — Memkompreneble, ke pere de ni, vi povas ankaŭ aboni *Oomoto* (japana eldono), kiu enhavas multajn aliajn artikolojn. Jarabono estas fr. sv. 4,80 aŭ egalvaloro.

S-ino O. L. en R. — Ni ĉiam akceptas volonte iun ajn helpon de ĉiu kaj tial ankaŭ al vi dankas por la kunlaboro promesita kaj varbado de abonantoj. Saluton!

VI HAVAS ION GRAVAN POR DIRI? Do skribu tuj al la Redakcio, kaj en la vononta numero ĉiu legos vian interesindaĵon.

Le Gérant: HENRI SELVES